



Svitavy. Kun Zamenhof kaj jubilea torto (Foto: Ján Vajs)

## Jubilea festo en la Esperanto-Muzeo en Svitavy

La 14-16an de septembro 2018 realiĝis en la ĉeĥa urbo Svitavy solena semajnfino, kiu kunvenigis preskaŭ kvindek da partoprenantoj, inkluzive de gastoj el Slovakio, Hungario kaj Francio. Krom la flagranta naskiĝtaga torto kun verda stelo atendis ilin bunta programo.

Vendrede vespere estis inaŭgurita nova tutjara ekspozicio “10 jaroj de la muzeo kaj 100 jaroj de la respubliko”. Dum la sabata solenaĵo oni povis sekvi bilde kaj rakonte resuman historion kaj atingojn de la muzeo. Kadre de la alparoloj prezentiĝis, interalie, la urbestro de Svitavy David Šimek kaj la direktorino de la urbaj muzeo kaj galerio Blanka Čuhelová, sen kies subteno la projekto ne povus sukcese evolui. Ĝojigaj estis salutleteroj el la Ministerio pri kulturo de Ĉeĥio kaj precipe el eksterlando, kio montris al la urbaj reprezentantoj unikecon de la internaciaj kontaktoj, kiujn Esperanto ebligas.

Sekvis ekskurso al la proksima renesanca urbo Moravská Třebová, koncerto de la ensemblo *Senprobleme* kaj amuza vespero. Dimanĉo estis dediĉita al Internacia Muzea Seminario, unuafoje okazinta en Svitavy, al kiu prelege kontribuis Vlastimil Kočvara, Miroslav Malovec, Vladimír Türk, Ján Vajs, Mária Pilková, László Szilvási kaj Peter Baláž. La du ĉeftemoj estis “Rezultoj de memstaraj esploroj pri la historio de la Esperanto-movado en Ĉeĥoslovakio en 1918-1968” kaj “Spertoj pri ciferecigado de dokumentoj kaj ilia utiligo en la muzea kaj biblioteka praktiko”.

En la sekvonta numero de *La Ondo* vi povos legi artikolon pri la konciza bilanco de la ĝisnunaj muzeaj aktivecoj.

**Pavla Dvořáková**